# TEJO-aktuale: numero 53, 2002-03

## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO: RICHA MUZIKA PROGRAMO

La kongreso okazonta en Pato Branko (Brazilo) de 21 ghis 28.07.2002 promesas tre richan muzikan programon: planatas partopreno de Alessandro Cossavella (argentinano, kantisto el la E-bando La Porkoj), DJ Roger (brazilanoj, jam delonge konataj pro iliaj prezentoj en E-medio en Brazilo), Merlin (Brazilo) kaj Esperanto-Desperado (Danio).

Nastia Kojevnikova nastia_kojevnikova@yahoo.com

## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO: VIZITINDAJ RETPAGHOJ

http://www.tejo.org/ijk la IJK-pagho, nun ankau kun fotoj de Pato Branko.
http://www.pr.gov.br/turismo multlingvaj informoj pri la kongresa regiono.
http://almanaque.intranetparana.br pri la sama regiono, kun detala mapo.

## SEMINARIO "E@I" EN JUGOSLAVIO

De la 28a de aprilo ghis la 5a de majo en Jugoslavio okazos seminario "Esperanto@Interreto" kun cheftemo "Rete lingvumi" pri uzado de interreto, lingvoinstruado, eblo envolvighi en internaciaj projektoj. Malalta kotizo, alta repago de vojaghkostoj! La seminario taugas ankau por Esperanto-komencantoj parolantaj la anglan.

Sonja Petrovic sonja_tejo@yahoo.com. Pliaj informoj kaj alighilo che http://www.tejo.org/seminarioj/echei2002_jug.jsp.

## CENTRA OFICEJO: NOVAJ RETADRESOJ

Ekfunkciis novaj retadresoj de la oficistoj en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj TEJO. La plej gravaj estas:

direktoro@co.uea.org gheneralaj demandoj pri administrado de UEA.
libroservo@co.uea.org por mendi librojn de la UEA-libroservo.
sekretario@co.uea.org adresshanghoj, alighoj, informoj.
kongresoj@co.uea.org demandoj pri Universalaj Kongresoj (UK).
uk.mendoj@co.uea.org por mendi hotelojn, ekskursojn, flugojn por UK.
financoj@co.uea.org demandoj pri pagoj, kotizoj k.s.
admin@co.uea.org por sciigi pri misfunkcioj.

## CENTRA OFICEJO: VOLONTULOJ-KOMPUTILISTOJ INVITATAJ

Por plibonigi la komputilajn aferojn che la Centra Oficejo (chefe la uzon de la datumbazoj membra, banka, kongresa kaj libroserva), fondighis la projekto "COreto". Ni invitas interesitojn alighi al ghia dissendolisto che http://co.uea.org/mailman/listinfo/coreto.

Joost Witteveen joostie@komputilo.org

## INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ EN POLLANDO

La Universitato de Adam Mickiewicz (la dua plej granda pola universitato) anoncas 3-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko. La sekva alighebleco estas por la studjaro 2002/2003. Surloka kurso (sesio) okazos unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro). Eblas alighi el la tuta mondo ghis la 15a de augusto 2002. Pli frua anonco bonvenas. Postuloj: abituro kaj bona scio de esperanto.

Informoj kaj alighilo: d-rino I. Koutny ikoutny@amu.edu.pl.